

# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 05/10/2019 Kvarcentkvardekkvina eldono (unua eldono 20/09/2011)



**Rapide ekrigardu ĉiujn titolojn.**

**Legu tiujn kiuj interesas vin**

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer [rogerspringer@tpg.com.au](mailto:rogerspringer@tpg.com.au);

**Uzindaj ligoj** [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#).

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. [rspring@tpg.com.au](mailto:rspring@tpg.com.au)

Entute **821,000** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **301,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)


Nun studas **282,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **238,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)



*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)*

## Gramatika serio “La Verbo en P.A.G.”. N.ro.88



Por la KAŬZO la tabelvortoj estas ial, tial, kial, ĉial, kaj nenial. PAG mencias, ke “ial” signifas “el ia kaŭzo”; pli ĝustas diri ke ĝi signifas “pro iu tialo”, ĉar “ial referencas al rezono, al rezonita sekvo, dum “kaŭzo” egalas al “proo”, natura sekvo nerezonita. Do :”Kial ci malfruas” demandas pri la rezonita decido malfrui, dum “Pro kio ci malfruas” demandas pri la hazardaj kaŭzoj.

PAG ankaŭ mencias, ke “nenial mi venos” povas signifi ke mi venos sed ne pro iu motivo aŭ tialo, kaj ke mi ne venos kvankam ne pro iu tialo. Por la unua signifo mi prefere diras “Mi venos sen tialo” kaj por la dua mi diras “mi ne venos sed sen tialo”.

Por “the reason” PAG mencias, kompreneble malĝuste, “la kialo” (= la demando pri la tialo, kio devas esti “la tialo”. (daŭrigota) **Marcel Leereveld**



**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

(*Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*)



## Mil-unu plantoj en mia ĝardeno.

### AŬSTRALIO AGU !

Antaŭ la fino de la nederlanda koloniado ante Indonezion (tiam ankoraŭ nomata “Holanda Orienta Hindujo”) okazis milito inter la indonezia sendependeco-movado kaj la armeo de Nederlando (kiun militon iniciatis la konata Esperantisto Drees kiel laborpartia ĉefministro). Kiam fine okazis pacointertraktoj inter la du militantaj partioj, en kiuj Nederlando pretis doni sendependecon al Indonezio, la nederlanda flanko pretis cedi ĉiujn insulojn kun indonezia popolo al unu ŝtato, Indonezio, tiel ekskludante la insulduonon (Okcidentan) Papua (tiam nomata “Novgvineo” en Nederlando) pro ĝia neindoneziana sed melanezia popolraso. Popolscience tio estis logika kaj popolrajta klaŭzo. Sed la brita kaj la usona registaroj, pro premo de Indonezio, kontraŭis tiun klaŭzon kaj devigis Nederlandon nenioigi la klaŭzon. Nun oni vidas la ĝustecon kaj la justecon de la nederlanda propono. Cetere la indonezianoj juĝas la melanezianojn malcivilizitaj kaj traktas ilin kiel bestojn. Ke Britujo kaj Usono devigis Nederlandon, teorie sian samideanon, estis tre malsaĝa kaj maljusta, kaj devas renversati de ili.

Mi postulas ke la aŭstralia registaro nuna premu la britan kaj la usonan registarojn, ja amikoj, nuligi sian antaŭan porindonezian decidon kaj agu por igi Indonezion doni al la papuaj popolo kaj teritorio ĝian sendependecon. Onia plej bona amiko (ĉi tie Aŭstralio) estas tiu kiu montras oniajn erarojn (de Britujo kaj de Usono).

*Marcel Leereveld.*

### KELKAJ ALDONAĴOJ PRI NEDERLANDO .

Je la grandeco de la duono de la insulo Tasmanio, ĝi estas nacio sur kaj ĉirkaŭ la delto de la rivero Rejno, kiu en la oriento enfluas el Germanujo, kaj de la malgrandaj riveroj Maas kaj Schelde, kiuj venas el Belgujo. La okcidenta kaj norda limoj estas Nordmaro, kiu en Nederlando devus nomiĝi Okcidentmaro kaj en Britujo Orientmaro. En la sudo la limo estas kun Belgujo, en kies norda kaj okcidenta parto (kaj parteto de Francujo) estas nederlandparolanta, kaj tial devus formi unu nacion de flandra Belgujo kun Nederlando. Sed tiukaze la limo inter la francparolanta parto kaj la tuta Nederlandflandrujo irus tra la mezo de la granda urbo (nun la ĉefurbo) Bruselo, kies sudaj francparolantoj ŝajnigas ne kompreni la nederlandan lingvon kaj kies nordaj flandroparolantoj ŝajnigas ne kompreni la francan lingvon, kiam oni deziras paroli kun ili. La due granda urbo belga estas Antverpeno, tute flandroparolanta.

La tuta okcidenta triono de Nederlando troviĝas sub la nivelo de la (Nord)maro. La resto troviĝas marnivela aŭ iomete supermara. La plej alta monto en la lando estas naŭcent metrojn super la maro, en la tuta sudo. Antaŭ la dua mondmilito, kiam ordinaraĵoj homoj ne kapablis turismumi eksterlande, tiu “monto” estis tre favora loko por nederlandaj turistoj.

La grundo de Nederlando konsistas nur el aŭ sablo, en la meza kaj orienta partoj, aŭ argilo, aŭ koto (sur la argilo). Nenie troviĝas ŝtonoj nek ŝtoneroj. Ĉiu ŝtono bezonata por konstrui la urbojn devas importati el aliaj landoj. La koto estas tiom fekunda, ke la farmistoj

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

rikoltas herbon por la multegaj bovinoj, du aŭ tri fojojn jare, malgraŭ la longa vintro. Antaŭ populado la delto kovriĝis per arbaroj de specialaj specoj de arboj kreskantaj en la akvo. La nura restaĵo de tiuj arbaroj estas la turista “Biesbosch”, kiun la roterdamaj UEA-kongresanoj vizitis per buso kaj boato. La nomo Holando venas el tiuj grandegaj arbaroj: *Holland* = *Woodland* = Lignolando.

Ĝis la komenco de la dudeka jarcento la nacio estis konata per la nomo Holando, ĉar en (Suda kaj Norda) Holando troviĝas la grandaj urboj kaj ankaŭ la riĉa agrikulturo. Multe da tritiko (kaj ankaŭ sukerbetoj) kreskigas sur la argilaj terenoj, nome la sekigitaj lagoj. Tiuj lagoj origine kovris okdek procentojn de Holando (kaj najbaraj Zelando kaj Frislando), sed el de la komenco la nederlandanoj “sekigis” la delton, por povi loĝi kaj kreskigi. Pro tio la proverbo: “Dio kreis la mondon kaj la nederlandanoj kreis Holandon”. Sed post la deknaŭa jarcento la ne-holandaj nederlandanoj forte agitadis por ke ĉiu nomu la landon Nederlando, speciale la registaraj instancoj faras tion, kaj la turistaj agentejoj. Kaj la germanoj jam ĉiam evitis la nomon “Holando”, ĉar ĝi memorigas pri la granda havenurbo Roterdamo, kiu estas la konkurenco de la germana havenurbo Hamburgo. “*Nederland*” signifas “suba lando”.

En plej multaj partoj de Nederlando troviĝas inter la antaŭaj marĉoj kaj la maro la sablaj dunoj, sur kies randoj oni kreskigas la tulipojn. Eble pli impresaj kaj belaj estas la multegaj fruktarbaroj, ĉar ili plej multe troviĝas en polderoj (= sekigitaj lagoj) inter la branĉoj de la rivero Rejno. La digoj tie konstruitaj ĉirkaŭ la polderoj estas pli altaj ol normale, por protekti kontraŭ la kelkfoje alta nivelo de la grandaj riveroj. Veturante sur tiuj altaj digoj oni rigardas kaj vidas la florantajn fruktarbojn alte desupre, kio montras blankajn aŭ kolorajn tavolojn multajn kilometrojn longajn.

Amsterdamo konstruitis, antaŭ ok jarcentoj, ne sur la firma grundo de la polderoj, sed sur la kelkmetrojn dika tavolo de koto. Por konstrui domon, oni devas unue batstampi dekojn da dekojn da metroj longajn fostojn (faritaj el arboj importitaj) por ripozi sur kaj en la firma tero, kaj post tio konstrui sur la fostojn la fundamenton. Ĉiuj domoj kaj domegoj bezonas tion. **Marcel Leereveld.**

## KIALO AŬ TIALO .

Kara Donald! Korekto: Ci mislegis ke mia juĝo “ne ... valora” celus cian serĉadon tra la literaturo. Tio ne ĝustas ĉar tiu esprimo klare nur celis cian tendencon doni gravecon al kiom da homoj samopiniis kun mi. Ke neniu samopiniis, ĉu tio estas motivo kontraŭ la ideo pri la rondecio de la tero?

Dankon pro cia, ree tre detala, respondo en n.ro 445 al mia en 444. (Notu ke mi uzas “ci” nur por diferencigi inter singularo kaj pluralo, kiel ĉe mi kaj ni; kaj ke mi ne postulas ke aliuloj faru la samon). Ĉifoje ci pli emfazis, ke “kialo” faratis el la subjunkcio “kial”. Ĉu tio signifas, ke “kialo” samtempe konstruitis el la demanda adverbo?

Ni evidente ne donas la saman signifon al la vorto “neologismo” En mia terminologio ĉiuj vortoj faritaj, per oficialaj finaĵoj aŭ afiksoj aŭ radikoj, el Oficialaj Radikoj estas oficialaj, do ne neologismoj. Tio inkluzivas vortojn kiaj “ene, troo, see, tabla, tableca, malstrango, iala, kielo, tialo, iaaĉo, tieo”, uzitaj de Zamenhof aŭ ne. Ĉiuj aliaj radikoj kaj iliaj derivaĵoj estas laŭ mi neologismoj. En lingvismo “neologismo” ne signifas novan vorton oficialvorte faritan el

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

oficialaj radikoj. Mi estas certa, ke Zamenhof samopiniis, pro la logikeco. Kaj se li ne samopinius, mi defius lin.

Ciaj opinioj en cia lasta artikolo bezonas, kompreneble, kritikan respondon, se tio eblas. Post mia unua respondo, en A.E. 443, mi atendis ke ci respondus nur per “Dankon, Marcel, vi konvinkis min ke la vortaroj malĝustas pri “kialo”, kaj mi el de nun uzos la vorton “tialo”,”. Sed ci ne skribis tion, kaj eble atendas ke mi respondos al ci per tiu konfeso. Sed nek mi tiel konfesas, (ankoraŭ?) ne konvinkita de tio kion ci trovas logika. Sed ĉar la tuta “interparolo” estas tre longa kaj eble tedos la legantojn, mi proponas al ci ke mi en ĉiu dua A.E. diskutos nur parton de la tuta problemo, kun cia posta respondo.

Por komenci mi nun juĝas nur cian kredon ke “kialo” fareblas el la subjunkcio “kial”. Penante fari la substantivon “kialo” ci ne konscias, ke ekzistas du malsamaj subjunkciaj adverboj, kiel jene: **1e.** Subjunkcia Rilata Adverbo (= rilata al antecedento), ekz. “Mi ne venis TIAL (= laŭ tiu motivo). KIAL (= laŭ kiu motivo) venis mia edzino”. Se ci volas fari substantivon el tiu “kial”, ci povas fari tion nur el “TIAL (= LAŬ LA MOTIVO) KIAL”, kiel mi klarigis en mia artikolo de pasinta semajno (445).

**2e.** Subjunkcia Demanda Adverbo (kiu rilatas al sia propra verbo nur), ekz. “Mi ne scias (= demandas), KIAL li revenis”. La demando estas “Kial li revenis”, kaj ree la “kialo” estas la demando pri io, ne la respondo, la motivo. Kion ajn ci provas, la substantivo por la demando estas la kialo, kaj la kialo estas la substantivo nur por la demando, la demando pri la motivo, kiu mem estas la respondo, do la tialo farita el la respondo. Nur eblas diri, ke la ĝenerala motivo, ne tiu de speciala kazo, estas la ialo.

El ĉi tiuj reguloj evidentiĝas, ke ekzistas ege malofta kazo por uzi “la kialo”, ĉar oni uzas “la demando” por tio, kaj ke same multe pli rekta ol “la ialo” estas “la tialo”.

Proksimfoje mi proponas ke mi enkonduku la problemon, kion fari kiam ni trovas aŭ opinias ke Zamenhof faris malĝustan klarigon pri gramatika problemo (plej ofte problemeto).

*Marcel Leereveld.*



## La Manlia Esperanto-Klubo

Anoj kunvenas la unuan kaj trian sabatojn je la 10<sup>atm</sup> ĝis 12 tagmezo, Bavarian Beer Café, Manly Wharf. Unu taso da



klubpagota kafo atendas vin. La 5a de oktobro estos la unua sabato. Venu!

*Roger Springer*

## El Perto

La lastan sabaton de septembro Shayne, Trish, Lindel, Heather kaj mi neetnolingvis dum unu horo da kafo-trinkado kaj babilado en kafejo en la ŝtata biblioteko. Nu, verdire nur du homoj babilis kaj tri plejparte aŭskultis. Rigardis nin severe nia unu metro longa, verda gardisto, Kroko. Precipe plaĉis, ke Shayne ne permesis eĉ flustron da klarigo en la angla. Ni devis strebi komprenebligi vorton aŭ esprimon sole en Esperanto. Kroko aprobis.

*Vera Payne*



***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***



## Raporto pri Melburna lingva evento

Jen vi povas aŭskulti raporton (en la angla) pri la Melburna lingva evento kiu okazis la 21an kaj 22an de septembro. Je 9:30 post la komenco vi povas aŭdi mallongajn komentojn pri mia prelego pri Esperanto. <https://www.language lovers.com.au/podcast/ep-012>

Mi scivolemas kial neniu el la Melburnaj Esperantistoj partoprenis (krom Benny). Almenaŭ vi povas aŭskulti raporton kaj eble partopreni en venonta tia evento.

Amike, **Nicole Else**



### BRISBANA ESPERANTO - SOCIETO

Kunvenas la duan sabaton ĉiumonate,  
13.30 ĝis 16.00 horo, ĉambro 1.9  
Brisbane Square Biblioteko, Adelaide St.

Vizitantoj estas bonvenaj

BES/ TES MEMBROJ Linda Danzer and Sandra Connors vizitas la Florofestivalon en Parko de Toowoomba informis **Peter Danzer**



## El Francujo

Saluton,

Loĝante en Francio, mi plezure legas vian bultenon de pluraj jaroj. Mi interalie tre ŝatas artikolojn de Marcel L.. Ŝajnas ke Esperanto kaj ĝardeno estas respektive efikegaj por nutri la grizajn celojn kaj la korpon ! Do, jen du demandoj :

1 ĉu eblas aldoni mian retadreson al la listo de gericevantoj? (*farita*)

2 ĉu ankoraŭ eblas aĉeti la libron de gramatiko de Marcel L.? ([www.esperanto.com.au](http://www.esperanto.com.au), kontraŭ +- \$ 20.)

Antaŭan dankon pro via respondo.

Bonan daŭrigon ! Amike **Kris Kezer**

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**